

Nova provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia
Numero 6 Oktobro 1993

Laŭ raportoj ricevataj pri la Universala Kongreso en Valencio, la propono pri lingvopolitiko de UEA-estrarano Ian Jackson (aperigita kun rilataj dokumentoj en nia lasta numero), ne atingis voĉdonon ĉe la Komitato, sed estis retirita de sia aŭtoro kaj nur iom diskutata en malgranda laborgrupo. Multan dankon al la novistoj kiuj kontaktis respondecojn de UEA pri la propono, kiu laŭ komuna opinio neniam estos denove prezentita en sia nuna formo.

Sed ĉu tio reprezentas venkon por Novo? Ne vere. Ni restas komplete kontraŭcenzurataj en la eldonaĵoj de UEA (sen la rajto, ekzemple, partopreni la nunan debaton pri strategio), kaj nia aliĝpeto kiel kunlaboranta fakasocio ankoraŭ havas malmultan ŝancon je akcepto. Laŭ la tradicia mitologio ni restas subfosantaj perfiduloj, kaj estas tre malfacile ŝanĝi tion. Anstataŭ kompreni ke ni volas liberaligi kaj sendogmigi UEA por ke ĝi akiru pli da respekto, oni emas opinii ke ni volas nur "uzi" ĝin por iuj apartaj celoj. Tamen ne estas komplete tiel. Iuj, inkluzive de pluraj ofichavantoj ĉe UEA, komprenas tre bone la indon de la Novo-afero. Unu altrangulo diris al alia dum la UK: "Ni lasu al Roy reformi Esperanton de interne. Tio estos pli bone por ni, kaj pli efike por li."

Bedaŭrinde, estas malmulta evidenta boneco aŭ efikeco en la rezultoj de nia dua voĉdono, kiuj aperas sur paĝoj 50-51 de tiu ĉi numero. Pro nesufiĉa klarigo, okazis ia miskompreno pri la "for"-proponoj (52, 57, 70, 80, 89, 105, 116, 123). Proponita ne estis la forigo de la litero en tiuj ĉi kazoj, sed de la koncerna fonemo. La plimulto pri forigo de ĵ (89) estas tiel senvalidigita, kvankam restas sufiĉe klara la ĝenerala malpopulareco de ĵ (80).

Se ellasi tiujn du proponojn (kun pardonpeto pro la konfuzo), restis sep kun signifa plimulto de jesoj: 68, 87, 91, 100, 101, 118 kaj 130. Ni ĝenerale interkonsentas, do, ke:

1) **La litero y estu enkondukita, kun sono de la nuna ĵ.** Plimulto esprimis la preferon ke ĵ ricevu la sonon de ĵ. Kiel rimarkas nia nova membro s-ro Dalton, tio ĉi estis proponita de Zamenhof mem (Leteroj II, p. 117).

2) **Estu nur unu litero por la k-sono.** Tiel malakceptiĝas la propono de Unio por Nova Alfabeto, laŭ kiu iuj k-vortoj estu skribataj per qu. Granda plimulto favoris la literon k por tiu sono.

3) **La literoj b, d, e, f, h, i, l, m, n, o, p, t, u kaj v restu senŝanĝaj.** Nur s-ro Navareño neis al tiu propono, argumentante ke la sensupersignaj diftongoj au kaj eu implicas ŝanĝon de la litero u. Ĉu aŭ ne oni konsentas kun li pri tio, estas interesa opinio; se li pravas, oni rajtas kompreni la preskaŭan unuanimecon ĉe tiu ĉi demando kiel definitivan malaprobom pri vokal-modifantaj diftongoj. Tia kompreno konformas kun la rezulto ĉe propono 1, ĉe kiu nur unu membro aprobis diftongojn per i.

Fine, signifa kialo de la malfrua apero de tiu ĉi numero estas la lastatempa okupiĝo de la redaktoro pri telekomunikado kaj tutmondaj komputilaj retoj, per kiuj la Novo-projekto povus iri multege pli rapide kaj interaktive. Raporto pri tio aperos en la venonta numero de NOVA PROVO, kiu kredeble estos la lasta en papera formo.

“Tutmonda Lingvo”

Mi proponas ne reformon de Esperanto, sed veran, internacian planlingvon – “Tutmonda Lingvo” – kun la jenaj kondiĉoj: 1) simpla kaj natura; 2) neniom da supersignoj; 3) simpla gramatiko kaj vortaro; 4) pluralo kun s; 5) nova akuzativa formo; 6) la akcento en la antaŭlasta silabo; 7) la bazo devas esti Esperanto.

ALFABETO KAJ PRONONCO

La alfabeto de la “Tutmonda Lingvo” estas simila al la hispana alfabeto:

Litero	Prononco
A, a	a – aborigeno, abrikoto
B, b	b – balanco, baldaŭ
Ch, ch	ĉ – ĉiopova, ĉu
C, c	c – kobalto, klimato
D, d	d – diversa, dormi
E, e	e – erodo, eseo
F, f	f – fortuno, frida
G, g	g – grandega, guto
H, h	h – hakilo, hematio
I, i	i – imperativo, intermezo
J, j	j – jogo, jugulara
K, k	k – kilometro, kimono
L, l	l – letero, longa
M, m	m – mino, muziko
N, n	n – nebulo, nutri
O, o	o – ovulo, ozono
P, p	p – pacifismo, profesio
(2) Q, q	k – ĉemio, kerubo
R, r	r – restoracio, rumo
S, s	s – saluti, spado
Sh, sh	ŝ – ŝultro, ŝuti
T, t	t – trono, tuta
U, u	u – unu, uzino
V, v	v – vagono, vekti
W, w	ŭ – ŭesto
X, x	ks – eksplodo, ekstremo
Z, z	z – zenito, zumi

La nomoj de la literoj estas: a, be, ce, che, de, e, fe, ge, he, i, je, ke, le, me, ne, o, pe, qu, re, ese, esh, te, u, eve, we, exe, ez.

Oni devas fari la veran internacian planlingvon en kunlaboro; unu sola homo ne povas fari ĉion.

Mi pensas ke ni devas havi en ĉiu lando kiu havas membrojn de Novo, delegitaron por kunlabori, kaj tiel ni baldaŭ povas kontakti rekte kaj solvi la lingvoproblemojn kune.

Julio Martínez (Kubo)

Komento pri la elpaŝo de Ian Jackson

Mi neniel dubas pri la bonaj intencoj kaj lojaleco de S-ro JACKSON, kiu evidente deziras ŝirmi kaj sekurigi la “netuŝeblan Fundamenton”, tiel karan al la gesamideanaro. Laŭ lia plano, Oficiala Konstitucio de UEA tion do garantiu “por eterne”.

Bedaŭrinde, li ne rimarkis kaj ne scias, probable kun pliparto el niaj movadanoj, ke ekzistas profunda kaj normale ne akordigebla konflikto inter – se uzi metaforon – la “interna ideo” kaj la “fina venko”.

Tiun blindecon sufiĉe klare atestas lia kombino en paragrafo 7, unuflanke ke (tute prave) oni donu strategian prioritaton al la terminologia problemo, aliflanke ke ĉiu faka nocio estu “samprecize esprimebla kiel en nacia lingvo”.

Nu, la demando pri vortformado en sciencoj kaj teknikoj estas nenio specifa nur por Esperanto, sed ja problemego kaj problemaro kun kiu luktas kaj baraktas la naciaj lingvoj! Ĝuste en naciaj lingvoj regas tiel kompleksa kaj aosa situacio rilate fakvortaron, ke lingvistoj kaj specialistoj apenaŭ scias kiel meti ordon en tiu veprejo. Ĝuste pro tio nia karmemora pioniro Eugen Wüster fondis la internacian instituton INFOTERM en Vieno, sub aŭspicioj de UNESCO, kiu instituto havas multnombrajn filiojn en multaj ŝtatoj, same forte kaj same vane baraktantaj por venki tiun lingvodrakon. Al tiu, kiu ne povas kredi la urĝecon, akrecon kaj kolosecon de tiu tasko, mi tre konsilas iom legi en la (tre multekosta) trivoluma kompilaĵo de Fodor & Hagège, *Language Reform / La réforme des langues / Sprachreform* (Buske Verlag, Hamburg 1983).

Se do Esperanto, tra sia fifama Dekkvina Regulo, vere sekvu tiun ekzemplon de zigzaga kaj hazarda “natura evoluo”, ĝi nur transprenos la internacian premsongon de fakuloj kaj povos oferti al la mondo nenion, sur tereno kie la mondo ĝuste serĉegas solvon, sur tereno kie ĝuste la Internacia Lingvo *en principio* posedas grandegan atuton.

Naciajn lingvojn oni ja tute simple ne kapablas reformi tiugrade, ke ili estos efektive adaptitaj al la koncerna bezono, kaj oni do daŭre restas ĉe nuraj paliativoj *ad hoc*. Memoru la vanajn provojn de ekzemple la franca, por anstataŭigi anglajn terminojn per nur propraj, aŭ la tragikomiajn provojn enkonduki kelkajn tute etajn kaj bagatelajn raciigojn en

la ortografio de malmultaj vortoj. Male, Esperanto – tiom longe kiom ĝi ankoraŭ ne estos oficiale agnoskita kaj uzata en la *ĉiutaga vivo* – ankoraŭ havas la eblecon adapti sin al la bezonoj de nia aktuala kaj estonteca epokoj!

Nepre notu: temas ne pri la ordinara vortaro kaj ordinara regularo, sed pri plancela (re)-organizo de la faklingva vortotrezoro, kiu nombras plu ne centojn da elementoj, sed ja centmilojn kaj eĉ milionojn! Tiun neimageble grandan glacimonton ni do, laŭ S-ro Jackson, plu provu fandi per la jam tradicia konstanta spirblovido fare de multaj verdaj buŝoj, ĉar tio ja estas la sola “metodo” provizita de nia Dekkvina Regulo . . .

Evidente, Zamenhof ja sentis la problemon, sed ne trovis alian solvon ol tiun tute malprecizan kaj senspecifan kromregulon. Dek ses (fakte 15) gramatikaj reguloj por regi centojn da ordinaraj vortoj, unu regulo por regi milojn da sciencoteknikaj vortoj; ĉu tio estas sana proporcio kaj taŭga solvo??

Restu do ĉe via Fundamento, alidire ĉe la Sanktega Tradicio, kara samideano, kaj neniel adaptu Esperanton al la bezona tutmonda vetkurado sur tiu tereno, sed tiukaze ankaŭ toleru ke ĝi porĉiame restos en la ombro de la mondhistorio, stumblante per sciencoteknikaj lambastonoj.

Aŭ toleru, ke ĝi ja ricevu koncernajn adaptajn kaj iĝu ĉampiono ne venkebla de iu ajn nacia lingvo, sed tiukaze pro superflueco perdante sian “internan ideon”, fosiliĝintan en la Tradicio. *To be or not to be . . .*

Manuel Halvelik

Korekto: La ampleksa verko de Manuel Halvelik pri terminfarado menciita en *Nova Provo* 4 (p. 32) estas *Nova Nomenklatur pri Lingviko*. La verko menciita en *NP* estas tute sendependa kaj aparta broŝureto, kaj traktas la terminologian temon nur tute ĝenerale; ĝi ne estas ĝis nun enmerkata, sed estis kopie kaj senpage sendita al kelkaj personoj kiuj havas intereson por la demando. La 300-paĝa *Nova Nomenklatur* estas vendata de la belga eldonejo Sonorilo kontraŭ 60 nederlandaj guldenoj, ĉiuj kostoj enkalkulitaj. Ĉe la sama eldonejo haveblas broŝurforma traktaĵeto de la sama aŭtoro, “La internacia Terminologia Ŝlosilo por Sciencoj kaj Teknikoj”, kun tradukoj planataj por la franca, germana kaj nederlanda lingvoj.

NOVAJ MEMBROJ

Husejn M. Al-Amily, 134 Brent Road, Southall (Gr. London) UB2 5LD, Britio
S. R. Dalton, 70 North Lane, Leeds LS8 2NG, Britio

Claus J. Günkel, Im Lichtenfelde 70, 33100 Paderborn, Germanio

Julio Martínez Domínguez, 259 CP. 12000, La Habana 20, Kubo

M. Reza Torabi, P. Kesto: 17765-184, Tehran - 17, Irano

Jeffrey S. Wilson, 1167 B Appleseed Lane, Olivette, Missouri 63132, Usono

ADRES-ŜANĜO

Roy McCoy, 100273.1415@compuserve.com (ankoraŭ loĝas kaj ricevas normalan poŝton ĉe Bajonetstraat 78, 3014 ZL Rotterdam, Nederlando, sed trovas sin fidiinde respondanta nur al elektronika poŝto sendata al la supra komputilreta adreso; pardonpeton al neresponditoj)

OBSERVANTOJ

Kelkaj petoj fariĝi observanto estas lastatempe rifuzitaj. La celoj estas, unue, kuraĝigi hezitemajn homojn aktive partopreni, kaj due, malhelpi la aliĝon de homoj kiuj estas nur scivolaj aŭ eĉ malsimpatiaj al la celoj de la asocio. Antaŭe akceptitaj observantoj restas ligitaj, kaj novaj estos akceptitaj se ili observas ne kiel individuoj, sed kiel oficialaj reprezentantoj de aliaj planlingvaj organizaĵoj. Eblas ke tiu ĉi politiko estu modifita se plimulto de la Novo-membraro tion deziras.

FINANCA RAPORTO

Estas nun 52,74 nederlandaj guldenoj en la konto novo-x ĉe UEA. Ekde la lasta raporto en *NP4*, kotizoj kaj aliaj pagoj sumiĝis je 534,98 guldenoj, dum estis elprenoj je 261,40 por afranko, 115,65 por fotokopio, 154,79 por kovertoj kaj aliaj materialoj, kaj 25,60 por nia lasta anonceto en la revuo *Esperanto*, post kiu la Estraro de UEA malpermesis pluajn. Detala konteltiro haveblas laŭ peto.

Sintaxo de la prepozicioj al kaj de

En Esperanto la uzo de la prepozicioj estas tre grava, car anstatavas deklinaciajn kazojn kiuj estas en aliaj lingvoj.

La plej gravaj estas *de* kaj *al*, kies bazaj signifoj estas komenco kaj fino.

De montras ankaŭ genitivon.

En la propozicio “Li veturas de Madrido al Barzelono”, *de* montras la komenzon de la veturado kaj *al* yian finan zelon.

Rimarku ke kiam oni montras la finan zelon de la movo, montras ankaŭ la direkton. En “Li faras veturadon kies fino estas Barzelono” neniu prepozicio montras la direkton kaj ciuj komprenas yin.

Direkto estas linio lau kiu okazas movo. En Esperanto mankas prepozicio kiu montru nur direkton kiel la hispana *hacia*, la franca *vers*, la itala *verso*, la portugala *para*, la angla *toward*, la rusa *к*, ktp., tial por montri nur direkton oni uzas la akuzativon de direkto. Ekz.: iri dextren, maldextren, orienten, okzidenten, supren, suben, ktp. Tia akuzativo ne bezonas koni la zelon de la ago por montri direkton. Tial estus bone uzi *al* por montri zelon kaj la neologismon *pa* por montri nur direkton, car nuntempe “iri al Romo” kaj “iri Romon” estas ambau dubsenzaj por multaj personoj.

La prepozicio de kiam iras post substantivo (ec devenata de verbo), au post verbo sen ago, montras ciam la genitivan kazon.

La genitivo estas komplemento de substantivo kun adjektiva valoro kaj montras dependencan rilaton pri aparteno, posedo, konsisto, deveno au alia kvalito de la substantivo.

Ekz.: Bukedo de rozoj = bukedo da rozoj = bukedo el rozoj = roza bukedo = rozbukedo. Horlojo de kukolo = kukola horlojo = kukolhorlojo. Horlojo de suno = suna horlojo = sunhorlojo. La libro estas de mia patro. La bukedo estas de rozoj. La horlojo estas de kukolo.

La korelativaj pronomoj finante per *iu* faras la genitivon per deklinazio. De iu = ies; de kiu = kies; de tiu = ties, ktp.

La prepozicio de kiam iras post verbo de ago (ankaŭ post participo) montras la komenzon de la verba ago. Tiu komenco oni povas konsideri en la spazo, en la tempo, au en la aganto, tiu lasta nur ce la pasivo, car en la aktivaj verboj la aganto estas la subjekto.

Ekz.: “Li laboras de la oka yis la dek qwina horo” (komenco en la tempo). “Li promenas de

la domo al la arbaro” (komenco en la spazo; rimarku ke oni ne povas xanyi la vortordon, car se oni diras “Li promenas al la arbaro de la domo”, tio signifus ke li promenas al arbaro en kiu estas domo). “La fenestro estas fermita de li” (komenco en la aganto).

Kiam en la genitivo, la prepozicio *de* staras post substantivo kiu signifas agon, kiel substantivo ne estas verbo, kaj tial ne povas esti aktiva nek pasiva, povas okazi miskomprenon se la kunteksto ne donas alian klarigon.

Ekz. “murdo de soldato” povas signifii “murdo farita de soldato” (subjektiva genitivo) au “murdo farita al soldato” (objektiva genitivo). En tiaj okazoj oni devas uzi ne *de*, sed la jam montritajn esprimojn, au alian prepozicion kiel “murdo al soldato” au “murdo far soldato”.

En “bruligo de domo de indianoj”, la signifo estas “bruligo de indiana domo”. En “bruligo de domo farita de indianoj”, estas la indianoj kiuj faris la domon sed ne diras kiun faris la bruligon. En “bruligo farita de indianoj al domo” estas la indianoj kiuj faris la bruligon.

Tio motivas ke la vortordo de la prepozicio *de* estu tre rigora. Por eviti tian malfazilayon, oni uzas la nefundamentan prepozicion *far*, kiu havas unu solan signifon, bone determinita kiel postulas la 14^a regulo de la Fundamento. *Far* montras ciam la aganton, cu la agado estu esprimita per verbo au per substantivo. “Bruligo de domo far indianoj” estas tute klara: la indianoj faris la bruligon, sed ne la domon. La uzo de *fare* de anstataŭ *far* estas ne nur pli peza, sed ankaŭ kontrawa al uzo en ciuj lingvoj, inklusive Esperanto, car *fare* estas adverbo, kaj la adverboj povas rilati nur al verbo, al adjektivo, au al alia adverbo, sed en “bruligo de domo fare de indianoj” la adverbo *fare* rilatas al la substantivo *bruligo*.

La prepozicio al montras ciam la finan zelon atingita de la ago, cu la ago estu esprimita per verbo au per substantivo devenanta de verbo.

La dativo montras kiun rizevas profiton au malprofiton de la verba ago.

En Esperanto estas du prepozicioj por la dativo: *al* por montri kiun estas trafita de la ago, kaj *por* kiu montras kiun ne estas trafita de la ago sed rizevas profiton au malprofiton de yi.

La prepozicio *al* montras la nerektan objekton au nerektan komplementon de la ago. Ekz. “La flegistino injektas penicilinon al la infano.” La rekta komplemento de “injektas” estas “penicilinon”, la nereakta “al la infano”. “La patrino

donas kison al la infano.” “Kison” estas rekta komplemento de “donas” en akuzativo, kaj “al la infano” nereka komplemento en dativo.

Kiam la ago trafas du objektojn, la unua devas esti en akuzativo, kaj la lasta en dativo, sed kiam la ago trafas nur unu objekton, tiu estas samtempe unua kaj lasta, kaj tial oni povas uzi la akuzativon *-n* au la dativon *al*.

Ekz. “La patrino kisas la infanon” au “La patrino kisas al la infano.” Oni povas vidi ke la akuzativo ne estas tiel grava kiel oni pensas, car en unu ekzemplo estas en “kison”, en alia en “infanon” kaj en la lasta malaperis.

En PIV kaj PV, kiujn multaj konsideras kiel “Esperanta Biblio”, estas gravega misinstruo. En la vorto *al*, Rim. 4, diras yene: “Al kelkaj verboj oni trovas, eĉ ĉe Z, uzon de *al* tute kontraŭan al la vera senco: *ursino al kiu estas rabitaj ĝiaj infanoj*.^z *ŝteli, forpreni ion al iu; demandi, peti ion al iu*.^z *Kp de*. Tia uzo, influata de naciismoj estas evitenda.”

La kritikantoj de Zamenhof tute ne komprenas la sintaxon de Esperanto.

En la unua frazo estas la ursino kiun rizevas nerekte la malprofiton de la rabado, do, estas la nereka komplemento kaj tial devas esti “al kiu” kiel skribis Zamenhof. *De* estas la prepozicio de la pasivo, kaj tial “ursino de kiu estas rabita yiaj infanoj” signifas ke la ursino mem rabis siajn infanojn. Se oni faras la frazon aktiva – “Oni rabis yiajn infanojn al la ursino” – estas evidenta ke la rabado trafis unue al “yiajn infanojn” (rekta objekto en akuzativo) kaj poste “al la ursino” (nereka komplemento en dativo), kiu rizevas la malprofiton de la rabado, sed la rimarkantoj ne pensas pri la movo de la ago, sed pri la movo de la objekto. Se oni metas la frazon en yia normala vortordo, subjekto-verbo-komplemento, rezultas “yiaj infanoj estis rabitaj al la ursino”, kaj se diras “yiaj infanoj estis rabitaj de la ursino”, estas evidenta ke la ursino faris la rabadon.

Same okazas en “*ŝteli, forpreni, demandi, peti ion al iu*”. La ago trafis unue al “ion” kaj poste al “al iu”. Ekz. “Petro petas, mendas au ofertas libron al Maria per letero.” Oni povas vidi ke la letero kun la peto, mendo au oferto iras de Petro al Maria. En “Petro petas libron de Maria al xia patrino”, *de* estas genitivo kaj *al* dativo.

Bedaurinde multaj esperantistoj imitas al la bonaj aŭtoroj, sed ne metas en la unuan vizon al Zamenhof.

La prepozicio *al* montras la finan zelon plene atingita de la ago; *yis* kiam estas neplene atingita,

kaj *pa* montras proximunan zelon kaj estas uzata por montri nur direkton kiam oni ne konas la zelon. Tial en “Li iras *al* la arbaro”, la irado finas ene de la arbaro; en “Li iras *yis* la arbaro”, la irado finas je la rando de la arbaro; kaj en “Li iras *pa* la arbaro”, la irado povas fini en, antaŭ, au post la arbaro, car *pa* montras nur direkton kaj ne zelon.

La prepozicioj *al*, *yis* kaj *pa* montras ke la ago ne komencas en la sama loko kie okazas la fino. Kontrawe en la prepozicioj pri loko *en*, *sub*, *sur*, *super*, *ĉirkau*, ktp. la ago komencas kaj finas en la montrita loko. Kiam la ago komencas extere, oni povas uzi du prepoziciojn por montri tion, anstataŭ akuzativon post prepozicio Ekz.: “La kato kuras *al sub* la lito”, “La kato saltas *al sur* la tablo”, “La birdo flugas *al super* la ĝardeno”, “La infano iras *al apud* sia patrino”.

Juan Navareño

Alia planlingvoj

Mi tute konsentas kun S-ro Van Themaat, ke necesas studi alia planlingvoj. Mi mem ante ne longe finstudis kurso pri Volapuko, kiu estis tre utila. Interesita legantoy turnu si al Ralph Midgely, Flenef Bevūnetik Volapūka (Internacia Amikaro de Volapuko), 24 Staniwell Rise, Scunthorpe, DN17 1TF, Anglio au al Brian R. Bishop, Zānabūr Volapūka (Volapuko-Centro), 155 Leighton Avenue, Leigh-on-Sea, Essex, SS9 1PX, Anglio. Kursoy pri Ido estas havebla de la Ido-Librerio, 44 Woodville Road, Cardiff, CF2 4EB, Kimrio au de la Uniono por la Linguo Internaciona (Ido), 27 Ville du Bois, B-6690 Vielsalm, Belgio. Informoy pri Occidental/ Interlingue haveblas de Richard Sorfleet, 770 Chemin des Vieux Moulins, L’Acadie, Quebec, JOJ 1H0, Kanado, kaj pri Interlingua de Informations Interlingua, Juvelvej 25, DK-5210 Odense NV, Danio. Alia utila adresoy estas: Glosa, PO Box 18, Richmond, Surrey, TW9 2AU, Anglio; Loglan/Lojban: The Logical Language Group, 2904 Beau Lane, Fairfax, VA 22031, Usono au The Loglan Institute, 3009 Peters Way, San Diego, CA 92117, Usono (konkuranta versioy!); Unitario: Postfach 18.25, D-W-6140 Bensheim, Germanio (an nova poshtkodo mi ne havas); Poliespo: Bernice Garrett (Poliespo), 15555 Huntington Village Lane #240, Huntington Beach, CA 92647, Usono. Se iu havas adresoy de alia planlingva grupoy, estus utila publikigi adresaro chi-tie.

Ed. Robertson

Rezultoj de la dua voĉdono

Membroj	+ = <i>jes</i> - = <i>ne</i> 0 = <i>sindeteno</i>																																						
	51. <i>dj</i> , <i>ej</i> , <i>oj</i> , <i>uj</i> → <i>ai</i> , <i>ei</i> , <i>oi</i> , <i>ui</i>	52. <i>c</i> for (→ <i>t</i> , <i>s</i> , <i>ts</i>)	53. <i>c</i> → <i>tc</i> (<i>s</i> → <i>c</i>)	54. <i>c</i> → <i>ts</i>	55. <i>c</i> → <i>z</i>	56. <i>c</i> sensaŝanga	57. <i>ĉ</i> for	58. <i>ĉ</i> → <i>c</i>	59. <i>ĉ</i> → <i>ch</i>	60. <i>ĉ</i> → <i>cx</i> , <i>ĝ</i> → <i>gx</i> <i>ktp</i>	61. <i>ĉ</i> → <i>cz</i>	62. <i>ĉ</i> → <i>q</i>	63. <i>ĉ</i> → <i>ts</i> (<i>s</i> → <i>s</i>)	64. <i>ĉ</i> → <i>tw</i> (<i>s</i> → <i>tw</i>)	65. <i>ĉ</i> → <i>tx</i> (<i>s</i> → <i>x</i>)	66. <i>ĉ</i> → <i>x</i>	67. <i>ĝ</i> → <i>q</i>	68. <i>g</i> sensaŝanga	69. <i>gv</i> → <i>gui</i>	70. <i>ĝ</i> for	71. <i>ĝ</i> esence for (foja fonetika <i>dj</i>)	72. <i>ĝ</i> → <i>dj</i> (<i>j</i> → <i>j</i>)	73. <i>ĝ</i> → <i>dq</i> (<i>j</i> → <i>q</i>)	74. <i>ĝ</i> → <i>dy</i> (<i>j</i> → <i>y</i>)	75. <i>ĝ</i> → <i>g</i> (<i>g</i> → <i>q</i>)	76. <i>ĝ</i> → <i>gh</i>	77. <i>ĝ</i> → <i>gj</i>	78. <i>ĝ</i> → <i>j</i>	79. <i>ĝ</i> → <i>q</i>	80. <i>ĝ</i> for	81. <i>ĥ</i> → <i>hb</i>	82. <i>ĥ</i> → <i>k</i> (<i>k</i> → <i>c</i>)	83. <i>ĥ</i> → <i>k/h</i>	84. <i>ĥ</i> → <i>kb</i>	85. <i>ĥ</i> → <i>q</i>				
Alberg	0	0	0	0	0	+	0	+	0	0	0	0	0	0	0	0	+	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0			
Alves Pinto	-	-	-	-	-	+	0	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	+	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
Brilleaud	0	0	-	0	-	0	+	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
Galindo	-	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	+	-	+	0	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-		
Goeres	+	-	-	-	-	0	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	+	-	+	+	-	-	-	-	-	-	+	-	+	-	0	-	-	-	-	-		
Günkel	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	0	-	0	-	+	-	-	-	0	-	-	-		
Kelly	-	-	-	0	-	0	+	-	0	-	-	+	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	+	-	+	0	-	-	-	-	-	-		
Lécaille	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	0	-	-	0	-	0	-	0		
Martins	-	-	-	+	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	+	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-		
McCoy	-	+	-	-	-	-	-	0	-	-	+	-	-	-	0	-	-	+	-	-	0	+	-	-	-	-	-	0	-	0	-	+	-	-	0	-	0		
Mizrahi	-	-	0	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	0	-	0	0	-	0	-	-	-	
Monĵa	-	-	-	+	-	-	-	-	0	-	-	-	-	-	+	-	-	+	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	0	-	-	-	-	-	-	-	+	-	
Navareño	-	-	-	+	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	0	-	-	+	-	+	0	0	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	
Riemersma	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	
Ringli	0	0	0	0	0	+	0	0	+	0	0	0	0	0	0	0	0	+	0	0	0	+	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	0	
Robertson	-	-	-	-	-	+	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	0	+	+	-	0	-	-	-	-	+	+	-	+	-	-	-	-	+	+	0	-	
Ruiz Karell	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-
Schumann	-	+	-	-	-	0	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	+	+	-	-	-	-	-	-	+	+	-	+	-	-	-	-	+	-	-	-
Stahl	-	-	-	-	+	0	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	0	-	-	-	-	-	-	-	+	+	-	0	-	-	-	-	0	-	-	
V. van Themaat	0	-	-	-	-	+	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	+	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	+	-	-	-	-
Werdin	0	-	-	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-
Wood	0	-	-	-	0	+	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	+	+	-	-	-	-	-	-	-	-	+	-	-	-	-	-	-	-	-	-
SUMO JESQJ	1	2	1	3	1	10	11	3	8	1	1	2	1	0	3	0	1	21	3	10	5	5	0	0	0	1	2	6	1	15	1	2	5	3	1	1	1		

Balde aŭ baldaŭe?

Tiu titolo ne signifas, ke mi sopiras la efektivigon de niaj novaj provoj kiel eble plej baldaŭe. Ĝi nur starigas la demandon: “Kiel anstataŭigi la adverbojn, kiuj nun finiĝas neregule per *-aŭ* anstataŭ *-e*?”.

Rimarku preterpasante, ke mi uzis du interpunkciajn signojn ĉe la fino de la ĵus antaŭa frazo. Oni kutimas ne fari tion, sed mi taksas ĝin logika, kiam frazo entenas alian. Ĉi kaze, temas pri tutfraza citaĵo, kiu finiĝas per demandosigno, en alia normala frazo, kiu postulas propran punkton.

Mi revenu al mia ĉeftemo. Kial Zamenhofs kreis adverbojn, kies fino ne havas la regulan *-e*? Kial ne tuj reguligi tion? Jen temeto, pri kiu estos eble pli facile interkonsenti. Kiun ne ĝenas nereguleco, interlingvaon lernu tiu! Espereble la plimulto el ni provos male reguligi. Kaj ni devas konfesi, ke Esperanto tre ofte iom similas interlingvaon, ĉe tre malbonaj partoj, tiel ke kritiki interlingvaon foje kondukas al memkritiko.

Interkonsento pri reformo postulas, ke oni samon volas ŝanĝi same. Post supozo, ke la plimulto konsentas forigi la *aŭ*-adverbojn, necesas decidi kiel. Plej ofta propono estas forigi *-aŭ* kaj meti *-e*. Ekzemple, anstataŭ *baldaŭ*, ni uzus *balde*. Jen certe logika kaj ekonomia solvo. Ni faru pli profundan analizon por vidi la konsekvencojn. Kiu ne jam aŭdis la vortojn *baldaŭa*, *morgaŭa*, . . . ? Eĉ foje oni jam aŭdas la nun troan vorton *baldaŭe!* Nu la propono ŝanĝi *baldaŭ* al *balde* signifas samtempe, ke *baldaŭa* iĝas *balda*. Jen certe bela, simpla kaj ekonomia ŝanĝo. Sed ĉu tiu ŝanĝo necesas? Ni ne forgesu, ke se oni tro deziras perfektecon, oni pli bone refaru la tutan lingvon sendepende de ekzistanta esperanto. Nia celo, laŭ mia kompreno, estas plibonigi esperanton, por forigi bedaŭrindaĵojn, sed ne ŝanĝi ion por io sam-nivele bona, nur pro personaj ŝatoj.

Mian proponon vi jam antaŭvidis. Ni aldonu *-e* sen forigi *-aŭ*. Tiel, *baldaŭ* fariĝu *baldaŭe*. *Baldaŭa* kaj aliaj derivaj vortoj tute ne bezonos ŝanĝiĝi. Iu ajn povas jam uzi tiun reformon, kaj neniu esperantisto, eĉ kontraŭreformema, povos plendi pri eraro (ja se oni jam povas diri *baldaŭa*, oni certe egale povas diri *baldaŭe!*). Kaj eble pli kaj pli da esperantistoj uzos nature la novan provon pro ŝato de ĝia reguleco. François Lo Jacomo ne ŝatas reformojn, sed ja ŝatas enkonduki evoluigojn, eĉ antaŭ la ĝenerala

akcepto. Ni sekvu lin. Ĉiu ŝanĝo estas unue uzata de unu homo, kaj tiam sen aprobo de vortaroj kaŭ gramatikoj. Tiel evoluas rajte lingvoj. Oni ne sentu sin kulpa.

Kompreneble, la propono estas pri ĉiuj adverboj, kiuj finiĝas per *-aŭ* anstataŭ *-e*, ekzemple: *hodiaŭ*, *morgaŭ*, *baldaŭ*, *ankoraŭ*, *almenaŭ*, *apenaŭ*, *preskaŭ*.

Ekzistas aliaj adverboj, kiujn oni povus trakti same, kaj ili montras la taŭgecon de mia propono kompare al la ideo forigi *-aŭ* por aldoni *-e*, ĉar tiuj ne enhavas la finaĵon *-aŭ*; *for*, *jam*, *ĵus*, *tuj*, *nun*, *nur*. Kaj pri ili same jam ekzistas derivaj vortoj kiel en la esprimoj: “fora loko”, “nura ebleco”

Sed ni ne miskomprenu: prepozicioj kaj konjunkcioj kiel *anstataŭ*, *laŭ* kaj *aŭ* ne ŝanĝiĝu (almenaŭ laŭ tiu ĉi principo).

Mi parolu fine pri la vorto *ambaŭ*. Mi prezentas plurajn frazojn, kaj novan formon pli klarigan.

1. Ambaŭ skribiloj taŭgas. Ambaŭaj skribiloj taŭgas.
2. Ni iru ambaŭ. Ni iru ambaŭe.
3. Ambaŭ venis. Ambaŭi venis.
4. Prenu ambaŭ. Prenu ambaŭin.

Mi bedaŭras, ke la solvo en la frazoj 1 kaj 2 ne estas la sama ol en la frazoj 3 kaj 4. Ŝajnas ne eble derivi ĉiuj vortojn el unu radiko, ĉar foje *ambaŭ* estas pronomo (en frazoj 3 kaj 4), sed foje ĝi ne povas esti derivita el tiu pronomo. En la frazo 1, se oni skribas “Ambaŭiaj skribiloj taŭgas.”, ĝi signifos “La skribiloj de ambaŭi taŭgas.”.

Sed kial havi vorton por “la du” kaj ne por “la tri”, “la kvar”, kaj tiel plu? Mi proponas, ke pro ĝia nereguleco, kaj pro ĝia neĝeneraligeblo al la aliaj nombroj, oni simple ne uzu plu tiun vorton (*ambaŭ*). Rimarku, ke oni povas ankaŭ diri “ĉiuj du” anstataŭ “la du”, kaj tio ebligas montri eventualan akuzativon (por kiuj deziras konservi ĝin!).

Patriko Monĵa

Red.: Estas malfacile imagi ke la propono de s-ro Monĵa trovos multan subtenon. Ne estas evidente ke liaj novaj formoj de la *aŭ*-adverboj ŝanĝas la lingvon malpli ol simpla anstataŭigo de *-aŭ* per *-e* — ŝanĝo kiun li mem taksas bela, simpla, logika kaj ekonomia. Cetere, la nura aldono de *-e* ne sukcesus forigi la supersignon, modifo kiu necesus por kontentigi la preskaŭ unuaniman deziron por sensupersigna alfabeto indikitan en la unua voĉdono de Novo.

Skribas Pietro Dao, kontribuinto al NOVA PROVO, reage al propono ke li aliĝu al la asocio: "Mi devas diri ke yam de kelkaj numeroy via bulteno de 'Nova Provo' tute ne placas al mi. Yen la kialo: mankas metoda laboro, ciuj skribas pri kiu ayn problemo, kaj tiel oni foruzos tempon senprofite. . . . Mi vidas kontraue nuntempe ke oni babilas senkonszie . . . Pro tio mi ne emas legi kion multaj skribas tute hazarde, nur proponante sed ne profunde pripensante kaj pravigante ciaspezajn solvoyn."

Tiu sento estas laŭ mi plene pravigebla, kaj mi mem dividas ĝin. Sed indas memori, ke Novo kaj NOVA PROVO estis en komenca etapo kiam aperis la "ajntemaĵoj" kritikataj de s-ro Dao, kaj ankoraŭ restas en tia komenca etapo. Nenio devigas ke Novo estu ĉiam hazarda kaj senmetoda, kaj se juĝi laŭ la unua voĉdono la plimulto volas ke ĝi ne estu tia. Tiuj kiuj ne volas kunlabori kun la aliaj, simple forfalos; aŭ, en iuj kazoj, simple ne restos spaco en NP por iliaj individuecaj kontribuajtoj.

Mi ne faros katalogon de kuraĝigaj signoj rilate tiun ĉi temon, sed komentos nur kiel ekzemplon la esprimitan volon de s-ro Alves Pinto kompleti reverki sian ampleksan reformproponon laŭ la komuna deziro de la aliaj novistoj. Espereble vi trovos kuraĝiga, kaj pens-instiga, ankaŭ la jenan kontribuajton de s-ro Kelly.

Pripensendaro por reformemuloj

1) Tiu kiu reformus la lingvon, zorgu! Nia lingvo ege valoras kaj reformagado estas afero terure danĝeroplana. Tiu kiu kontraŭstaras reformon, same zorgu! Vi jam forpelis dum jardekoj niajn agemulojn kiuj nun, perforte, nin kontraŭstaras. Dume la Mondo alrigardas, nefidante (ankoraŭ, post pli ol jarcento, la parolantoj de Esperanto sin nombras po nur 0.2%).

2) Oferti reformon estas facile; ekscii la koston de la disbranĉadoj de la reformero pli komplike!

3) Ni ne kreu regulon se eblas ekhavi la saman rezulton per forfando de regulo.

4) Ni demandu nin: Kial la mia sugesto estas pli bona ol aliaj sugestoj?

5) Ni pripensu: Kial la niaj ideoj ŝajnas al ni simplaj, kompreneblaj, eĉ sinoferaj, dum la ideoj de tiu aliulo ŝajnas al ni arbitraj, nenecesaj kaj iom pli ol ete komplikaj? Jen la kaŭzo: la niajn ideojn ni pripensadis dum iomaj monatoj; tiuj

aliaj ideoj ekalvenas tutnovaj kaj (ni flustru ĝin) ili kuras laŭ maloportuna angulo rilate je la niaj!

6) Ni nepre demandu: Ĉu tia ideo ŝajnas al mi esti la plej trafa nur ĉar ĝi similas la metodon aŭ la kutimon kion uzas la mia lingvo aŭ la fundlingvoj de mia propra kulturo?

7) Ni neniam forgesu ke, laŭ lingvo kaj laŭ kulturo, "intereŭropa" ne estas "internacia"; "nordokcidenta" ne estas "tutmonda". Ni demandu nin pri nia ĉia sugesto: Ĉu ni sufiĉe, kiel eble, enkalkulis la bezonojn de la parolantoj de (minimume kaj, prefere, inkluzive iliajn fratlingvojn): ĉina, angla, hispana, hinda, araba, bengala, rusa, portugala, japana, germana, franca, paŝtuba, ĝava, bihara, itala, korea, teluga, tamila, maratha, vjetnama (laŭ nombro da parolantoj) kaj la kreskantaj lingvoj: malaja, urdua, persa, tagaloga, thaja, turka?

8) Eksciu ke, ne nur la vortaroj, ne nur la esprimrimedoj, sed eĉ la esprimbezonoj de la Orientularo kaj la Sudularo nemalgrandparte malsimilas tiujn de la Nordokcidentularo. Esperanto nepre ne restu premvesto de l'animo de la Sudularo kaj la Orientularo, sed ekestu (kiel ne kapblas iu ajn nacia lingvo) la ponto per kio ĉiuj animoj renkontu *verforme*.

9) Iu dirus ke la literaturo estas la animo de la lingvo, kaj sen animo, lingvo mortos. Aliulo dirus ke la literaturo, pro tio ke ĝi estas eŭrope konstruita, estas ŝtono ligita ĉirkaŭ la kolo de la lingvo, kaj la pezo de tia memorŝtono de la pasinteco nepre malebligis la lingvon esti ligo preter la eŭropa aŭ nordokcidenta kultur-kampo. Ni konfesu: ili ambaŭ pravas!

10) Ni agnosku: Ne necesas, eĉ ne dezirindas, ke nia lingvo havu nur unu rigidan gramatikon. Dialekto estas la animo de Popolo kaj la koloro de Regiono. Necesas nur ke, se ni ne ĉiel komprenas iu la alian (Nordokcidento, Sudo, Oriento . . .) la kaŭzo ne estu la malriĉeco de nia lingvo!

11) Nia etiko estu: Pensado sufiĉa, kaj simpatio tutmonda.

Tony Kelly

Malpli kuraĝiga, tamen, estas la fakto ke kelkaj novistoj insiste gardas la sintenon ke nur iliaj proponoj indas je konsidero en la reformo. Ekzemple, vidu la sekvan artikolon, en kiu s-ro Stahl argumentas ke "Niaj sxangoj estu sol tiuj, kiujn mi demonstris." Necesas reemfazi, ke Novo ne estas projekto de iu ajn unuopulo.

Mirakla palaco kun necesejoj

Mi volas montri ankoraŭ alternativon pri alfabeto: $w = \ddot{u}$; $h = b$ kaj $\dot{}$; $cx = \hat{c}$; $sx = \hat{s}$; $q = \hat{g}$; $y = \hat{j}$. Tamen, se eblas uzi esperantan alfabeton, ni uzu qin.

Ni ne forigu la literon n pro tio, ke qi similas al m . La samo validas por \hat{c} kaj \hat{g} ; \hat{j} kaj \hat{g} ; t kaj d ; b kaj v ; c kaj s ; g kaj k , h , $\dot{}$; s kaj z ; r kaj l . Alie ni havos nur dek sep (17) literojn. La pronomoj *mi* kaj *ni* devas resti.

La litero c ne estas maldigramo. Qi estas unu litero kaj unu sono. dz ne estas digramo. Oni prononcas la literojn aparte, ekz.: *ed-zo*, kaj ne *law pola digramo*, kiu estas simila al \hat{g} .

Nia internaciezo devas esti komprenata fa esperantistoj kaj amata fa neologismemuloj. PIVo kaj PAGO estu ankaw por ni. Jo pli multe la internaciezo similos al E., aw jo pli poke ni sxangos an E., to pli scienca aw ruza estos nia ago. Ni ne malkovru an Ameriko, kiel faris la inventistoj an: Idiom Neutral, Ido, Novial, Inter glossa, Monling, Interlingua, k.s.

Niaj sxangoj estu sol tiuj, kiujn mi demonstris. E. estas preskaw preta. E. estas kvazaw palaco sen necesejoj (= necesaj neologismoj). Ni konstru(ig)u la necesejojn kaj ekloqu en mirakla palaco kun necesejoj.

Nian internaciezon akceptos sol neologismemuloj, kaj novaj lernintoj ne forlasos la internaciezon, kaj ni kreskos kvante, sed unue ni devas havi kvaliton. Kial la eklernantoj an E. forlasas an E.? Cxar E. ne havas neologismojn, kiujn mi proponas.

Pri vorto-trezoro mi klarigas jene: Ni, internaciezanoj, uzas la sekvantajn vortojn: PIVajn; poetajn, t.e. *mal-vorto-anstatawayojn* el PAGO 420, p. 507-508, por preventi akcidentojn, kiuj estas plej ofte kreitaj fa poetoj; ne-PIVajn, kiuj troviqas en aliaj vortaroj, plej ofte kreitaj fa neologoj.

La facileco det internaciezo ne devas konsisti en tio, ke en internaciezo (Esperanto) ni havu limigitan nombron da vortoj, kiel tion deziras la antineologismemuloj esperantistaj.

Se iam E. estos adoptota al internacia uzado, qi nepre devos alpreni la neologismojn, kiuj troviqas en *Ĉiu-Tagaj Vortoj kun Difinoj* kaj *Mankantaj Neologismoj kun Difinoj*, ambaw acxetebblaj cxe UEA. Cxu Z. prohibis plibonigon an E.? Ne! Ni ne fidu al antineologismemuloj. La progreson ni kalkulu per neologismoj. Fina venko signifas havi neologismojn kaj plibonigon.

Cxiuj havas (s)ian ligon. Ekzemple, kato-likoj, protestantoj, hobiuloj, poetoj kaj multaj similaj. Tamen, neologismemuloj ankoraŭ ne havas ligon. Kiam neologismemuloj plendas ion al antineologismemuloj, tio estas kvazaw kanario plendas al kato, "Kial vi manqas min?". Neologismemuloj ne sekvu grege la antineologismemulojn.

Tabel-vortoj devas resti, cxar ili estas geniayo des Z. Ni havis geniulojn: Z., K., W., kiuj donis al ni an E., kaj an PAGO, kaj an PIVO. Tiuj kreitajoj estas mirakloj.

Nun mi klarigas ion det gramatiko, kiel pli supera estas la internaciezo kompare al E. En E. (32, p. 60) mankas speciala vorto por signi *mal-inecon*. En internaciezo ni havas an *-ulo*. Ekz.: Katuno kaj katino estas gekatoj. Komparu: *-ullo*; *-uko*; *-udlo*.

E. ne havas genitivon det pronomo *mi* (43, p. 71). En internaciezo ni havas la genitivon, kiu estas "des mi". En internaciezo cxiuj pronomoj havas la genitivon per la prepozicio *des*. Ekz.: *cxio* havas la genitivon "des cxio".

"Mi nenial venos" (88, p. 119) signifas en la internaciezo: "Mi ne venos ial (ajn)." "Mi nenium vidis." = "Mi ne vidis iun (ajn)."

Internaciezo havas pli da prepozicioj ol E. en PAGO (120, p. 168). La esperanta fundamento proponas malfelicxon, kiu kawzas konfuzon (PAGO 135, p. 200). Ekz.: "La manqado de la kato de la rato" estas en internaciezo "la manqado fa la kato an la rato". Kato manqas, rato estas manqata. E. ne solvis tiun malfacilon (135, p. 201), internaciezo solvis tion. "La instruo de la apostoloj" (137, p. 203) estas en internaciezo: 1) "la instruo fa la apostoloj" = instruas; 2) "la instruo an la apostoloj" = estas instruataj. "Kondamno de la juqisto" (137, p. 203) estas en internaciezo aw: 1) "kondamno fa la juqisto", aw 2) "kondamno an la juqisto". En E. la prepozicio *de* povas esti ag-adjekta kaj ablativ-objekta (179, p. 246). Ekz.: "Ili estas distingitaj de ni" estas dusenca propozicio. En internaciezo oni diras aw: 1) "ili estas distingitaj fa ni" (ag-adjekta), aw 2) "ili estas distingitaj de ni" (ablativ-objekta). . . . La aldono an prepozicioj ne estas sxango en fundamento, cxar la prepozicio *de* restas, sed nur por la ablativa kazo.

Internaciezo estas Esperanto kun plibonigoj kaj kun neologismoj, ne kun sxangoj. . . Internaciezano estas homo, kiu uzas, aw strebas uzi, la internaciezon kiel hejman lingvon.

Richard Stahl

Fina reformo

Fina reformo, fina sukceso. Ni preferas g'in al venko, c'ar ne estos venkitoj, krom la lingvo-muro.

Reformoj estas dang'eraĵoj por Esperanto, c'ar ili dividas la esperantistaron, kaj malpliigas la s'ancojn de sukceso. Tial ni ligas nian reformon al adopto de Esperanto far internacia organizo, kiel UNO au' Eu'ropa Komunumo. Post la Fina Sukceso, Esperanto ne plu riskas ion, kaj la celo de Zamenhof estos atingita, celo pli grava por li ol la nes'ang'o de lia lingvo.

Trankvilig'u, ni deziras reformi nur la alfabeton, kaj la estontan evoluon de la lingvo – ne tus'ante nian kulturon. Temas pri limigitaj vortprovizoj kaj transskribo de propraj nomoj kaj de la prononco. C'i-tie mi parolos nur pri la alfabeto.

Ni proponas la jenan:

1) Provizora uzado de apostrofo anstataŭ c'apelo, kiam estas malfacilaj'oj por aperigi g'in. Tion mi faras tie c'i.

2) $c' \rightarrow ch$, $g' \rightarrow j$, $j \rightarrow y$, $s' \rightarrow sh$, $u' \rightarrow w$.

3) j' kaj h' malaperas de la kutima esperanta alfabeto. Tiuj literoj estas maloftaj, malfacile prononceblaj, kaj fonto de konfuzo (g' , j'). Ili estas anstataŭ'itaj per j au' k . Kiam tio ne eblas, oni uzu alian vorton:

meh'aniko → *mekaniko*

h'oro → *koruso*

j'urnalo → *jurnalo*

aj'o → *ajo* – sed *ag'o* → *adjo*.

En tiu lasta kazo, oni emfaze prononcu “d” kiam oni deziras diferenci la du vortojn.

4) Digramoj estas uzeblaj por pli g'uste transkribi proprajn nomojn: *kh* (h'), *zh* (j'), *gh* (araba *gh*), *th* (angla *th*), *dh* (araba konsonanto, prononcata kiel *th* en angla *the*).

5) Ankaŭ q (araba q), qu (ku') kaj x (ks) povas aperi en propraj nomoj.

Tio s'ajnas iom malsimpla, sed povas simple resumigi: *la konsonantoj havas sian c'efan prononcon en la angla, la vokaloj tiun en la itala.*

Kial tiu propono? Plural.

a) La kosto de la represado de vortaroj kaj gramatikoj estos ridinde eta kompare al tiu de la adapto de c'iuaj tajpiloj, komputiloj, programoj, presiloj, ktp. Antaŭ'vidinde, ke organizo deziranta adopti Esperanton, faros tiun kalkulon.

b) La c'apelitaj literoj estas gravaj por iuj

esperantistoj, ne por tiu, kiu eklernas la lingvon. Se Esperanto ig'as oficiala lingvo en iu lando, la novaj esperantistoj estos multe pli nombraj ol la malnovaj.

c) Preskau' c'iuaj teranoj vidis anglajn vortojn sur reklamoj, kaj multaj el ili konas la anglan prononcon, ec' se ili ne konas la lingvon au' nur balbutas g'in. Ni ne esperantigu tion, kio jam estas internacia!

Per tiu reformo, Esperanto ne plu postulos adapti onian materialon, nek lerni alian prononcon de la sama alfabeto. Tiuj malfacilaj'oj aspektus neutilaj al tiu, kiu estus devigata eklerni Esperanton.

Mi ja scias, ke tiu propono povas s'oki kelkajn, sed ni devas meti c'iuajn s'ancojn je nia flanko!

J. S. Brilleaud (Francio)

Red.: Ne ŝajnas tuj rimarkeble, kiujn aspektojn de sia propono s-ro Brilleaud konsideras ŝokaj. Ke oni favoru al anglecaj konsonantoj en la reform-alfabeto ne ŝajnas tro skandale (inter-alie ĉar la diferenco jam ne estas tro granda), krom ke la ch- kaj sh-diftongoj kontraŭas la Esperantan principon de unu litero/unu sono.

Ankaŭ ne ŝajnas terure ŝoke, ke la reformo estu principe gardata por kiam internacia organizaĵo alprenos Esperanton. Tio tute konformas kun la neta distingo de Teo Jung inter “praktika” kaj “teoria” interlingva agado, la unua nur peresperanta, la dua inkluzivanta ellaboradon de reformoj kaj alternativoj. Ankaŭ laŭ Jung, estu neniu anticipa provo enkonduki interlingvan formon konkurenca al Esperanto antaŭ la tempo de la Fina Venko.

Nu, tio estas konata, respektinda sinteno, sed ne sen seriozaj problemoj. Unue, ĝi implicas la supozon ke tradicia Esperanto kaj ties movado kapablos iom atingi tiun fabelan punkton de fina sukceso; kaj ju pli oni dubas pri la maloportunaj ecoj de Esperanto, des pli oni dubas pri tiu eblo. Due, ne ŝajnas eble fiksi limojn tiel ke reformlingvo ne iom eniru la praktikon. Ekzemple, se mi eltrovas sensupersignan formon kiu plaĉas al mi kaj kiun mi povas uzi en (specife elektronika) korespondado kun aliaj esperantistoj, ĉu mi ne jam uzu ĝin? Kaj ĉu tio ne implicas iuspecan inviton al simila faro?

La distingo tamen tuj prezentas sin inter privata lingvouzo, kaj publika kampanjo por akceptigi reformversion. Ni ja evitu la lastan.

Ĉu araba alfabeto por Esperanto?

Kiam antaŭ jarcentoj oni komencis uzi la arabajn ciferojn anstataŭ la romiajn, la mallarĝanimuloj kriadis: Jen satanaĵo, jen satanaĵo!

Ĉu ĉina, ĉu angla, ĉu araba, la skribita vorto estas nur *bildo*. Kiam oni legas, oni kutime efektive ne literumas vorton, sed aŭtomate memoras ĝian sonon tiel, kiel oni jam lernis ĝin (eĉ laŭ ne-fonetika literumado). Ju pli malgranda estas tiu bildo, des pli do rapide oni povas legi ĝin. La pli simplaformaj kaj pli malgrandaj literoj ebligas la formadon de pli malgrandaj vortoj, sekve frazojn, kaj do pro la simpleco kaj la kompakta formo, oni povas *pli rapide skribi aŭ legi* – ankaŭ povas *ŝpari* je inko kaj papero per skribado. Ni do esploru la avantaĝojn de la araba alfabeto.

1) La arabaj literoj plejmulte havas po unu formon, dum ekzemple la romia litero plejmulte havas po kvar formojn: du por manskribado kaj du por presado. Tio signifas: pli facile lerni kaj uzi la araban.

2) La araba litero estas geometrie malpli granda, ekz. Aa ا , Bb ب , Cc س , Dd د , ktp – kio ebligas pli rapidan legadon/skribadon.

3) La arabaj literoj plejmulte havas la formojn de cirkloj, kurboj (ekz. simile al stenografio Gregg) aŭ rektaj linioj; aldone al tio – kompare al romiaj presliteroj, kiujn oni pli kaj pli skribe uzas pro klareco –, ĉar plejofte la araba skribita vorto havas daŭrantan formon, t.e. oni malofte devas levi la skribilon de la papero, tial la mano povas pli facile, pli rapide kaj komforte moviĝi sur papero. Komparu jenajn ekzemplojn (kategorio A reprezentas plene vokaligitajn vortojn; kategorio B, la normalan duone vokaligitan skribon):

Zamenhof estas planinto de Esperanto.

(1A) زامنهوف استيس پلانيندو د اسپيرانتو.

(1B) زامنهوف استيس پلانيندو د اسپرانتو.

4) Dum estas kvin (longaj) vokaloj en Esperanto (*a, e, i, o, u*), estas oficiale ses vokaloj en la araba alfabeto: tri longaj sonliteroj kaj ties tri respektivaj mallongaj vokal-signoj (plus unu signo, kiu signifas ke *ne* estas ia vokalsono por tiu respektiva konsonanto).

Kvar el la kvin longaj sonoj de Esperanto havas precize la samajn longajn sonvalorojn en la kontraŭaj arabaj sonliteroj de: *a ا , e ء , i ي , kaj u و*. Tamen ĉar la sono de *o* ne estas en la araba lingvo, oni kutime uzas *و* por tiu sono, kiu devenas de vortoj el aliaj lingvoj.

Por havigi tiun sonon de *o* por Esperanto oni sugeste povas modifi la araban literon **و** ekz. per etendo de eta hoko al ĝi. Estas menciinde, ke ne-arabaj lingvoj, kiuj uzas la araban alfabeton kutime desegnas tiajn modifaĵojn por siaj ne-arabaj sonoj: ekz. la persa aldonas du suprajn punktojn al la araba *ز z* por akiri la Esperantan *ĝ*-sonon. Do, dum kvin longaj vokaloj, ankaŭ la respektivaj mallongaj sonoj de tiuj vokaloj, jam estas en praktika ĉiutage prononcata Esperanto, signoj por tiuj respektivaj mallongaj sonoj ne estas en Esperanto. Ili jam tamen estas en la araba alfabeto. Ekzemple:

La vokalo *a* en Esperanto havas du sonvalorojn en la vortoj *Esperanto* kaj *internacia*, nome: mallongan post *r* en *Esperanto* kaj post *n* en *internacia*, tamen longan post *i* en *internacia*. Tio same validas pri la litero *e* en *Esperanto*. Ankaŭ la sono de litero *s* ne estas la sama en *resumo* kaj *salono*, ktp. Tamen ĉar jam estas signoj en la araba alfabeto por tiuj precizaj du diversaj sonoj, oni povas facile skribe montri ilin por malebligi la konfuzadon. Resume, escepte de *o* ĉiuj Esperantaj sonoj havas konsonantojn/vokalojn en la araba alfabeto, *sed ne inverse*.

5) Por kompari, jen ekzemploj en la du alfabetoj.

Esperanto estas internacia lingvo.

(2A) اسپيرانتو ارستيناس ارستينرستتسيبا ليندغفو.

(2B) اسپرانتو استين انترنيسيا لنگفو.

Mi lernas Esperanton.

(3A) مي ليرنيس اسپرانتون.

(3B) مي ليرنيس اسپرانتون.

6) La belformo kune kun la kunfandiĝo de la araba alfabeto ebligas belan kaligrafion, kiu estas jam aparta belarto, al kiu eble nenio egalas en aliaj alfabetoj.

Do, kion do pensus vi, karaj gesamideanoj, pri mia eble cerb-ekzercada propono: *ĉu araba alfabeto por Esperanto?*

Husejn salutas vin!

(4A) طميين سلنو تنس قين!

(4B) حسين سلونس قين!

Hussain M. Al-Amily (Britio)

Nota: La arab-literaj vortoj de ĉi tiu teksto aperas tro longaj parte pro tio, ke por ekzemplado mi ĉi tie devis “vokaligi” ilin por preciza prononcado (frazoj A). Laŭ mia malnova komputil-programo, oni do devas krei apartajn spacojn por la vokaloj (supraj kaj malsupraj), kio ne estas necesa en kutima skribado (frazoj B). Cetere oni ne vokaligas krom por lernej-infanoj kaj en klasikaj kaj akademaj verkoj.